# EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

## Enhavo


- AMO 67 – iĝis 69 – junuloj en Eŭropo
- La kongresa  kuriero pluvivas!
- Memoroj pri Hiroŝimo
- Estraro de TEJO anoncota


Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-44 sendita el Budapeŝto, la 30an de aŭgusto*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO 67 – reveno al la brula temo post 50 seminarioj

Tiu seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) ekos post nur du semajnoj, virtuale gvidata el Pollando kun teknika help el Irano. Kio estas tiu brula demando? Jene: Kiel ni en Eŭropo sukcesu rejunigi nian komunumon? Pli precize, jen la temo de AMO 67:

### Varbado de Junuloj en Eŭropo

Ni alkroĉas artikolon pri la temo en la novembra numero de revuo *Esperanto*. Tio estis pretigita kiel prepara materialo por AMO 17 okazigita en la hungara urbo Eger silvestre de 2015-2016. Ni reaperigas la artikolon, ĉar ĝi restas deprimige aktuala. Esence, la du eventoj, disaj je 50 seminarioj, revenas al la sama nesolvita problemo. Eĉ kiam AMO 24 en Odenso, Danlando traktis rilatan temon kaj faris konkretajn rekomendojn pere de FLAM-analizo.

Kial AMO rezultas en tiom malmultaj atingoj? Nu, ĝi altiras lavangon de bonaj ideoj kaj proponoj kaj eĉ detalaj planoj kaj rekomendoj, sed mankas la rimedoj – financaj kaj homfortaj, agpretecaj – por transformi tiujn proponojn al projektoj.

Anoncu vin al deziro partopreni en la seminario, kaj ni sendos al vi la alirajn informojn en la tagoj antaŭ la aranĝo, kiu okazos posttagmeze de dimanĉo, la 13an de septembro.

# La virtuala UK aperigis retajn kurierojn




Aperis la dekdua numero de la Festivala Kuriero. Legu, ĝuu, senpage elŝutu, libere kaj aktive diskonigu ĝin al viaj amikoj en Esperantujo! Troveblas tie ankaŭ la pli fruaj kurieroj.

https://revuoesperanto.org/kuriero12

# Hiroŝima memorata en Monda Fest'

Okazis la inaŭguro de la Virtuala Ekspozicio Hiroŝimo-Nagasako: 75 jaroj por paco: https://mondafest.net/hiroshimo. La ekspozicio inaŭguriĝas kadre de la Virtuala Kongreso de Esperanto (aliĝi ankoraŭ eblas ĉe https://vk.mondafest.net) kaj en la 75-a Memortago de la

Atombombado sur Hiroŝimo. La ekspozicio inaŭguriĝas per du salonoj: Memore (1) kaj Klerige (2). En la Salono 1, vizitantoj povos konatiĝi kun 70 fotoj kaj bildoj kolektitaj de la Eldon-komitato de Hiroŝmo-Nagasako. La salono estis kunordigita de Michela Lipari, prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, al kiu UEA kore dankas. La Salono 2 proponas tri prelegojn, kiuj ebligas al esperantistoj konscii pri la graveco de la temo por paco. UEA kore dankas al Mirejo Grosjean, prezidanto de ILEI, kaj Osioka Taeko, hiroŝimano, pro la prezento de la prelegoj. La tri prelegoj okazas nun kadre de la Virtuala Kongreso kaj estas libere spekteblaj rekte en la ekspozicia paĝo kaj en la jutubkanalo de UEA, UEAviva: youtube.com/UEAviva. Jam temp' está por paco!




## Nova estraro de TEJO ekoficos

Nia junulara sekcio elektis novan estraron, kiu ekoficos ekde la unua de septembro. Ni pretigas prezenton de la nova teamo, kiun ni aperigos en venonta EKO-komuniko. TEJO nepre devas ludi gravegan rolon por porti al nia komunumo pli da junaj fortoj, precipe en Eŭropo. Jam en aliaj mondpartoj ĝi kreis signifajn rezultojn; necesas similaj strategioj por Eŭropo!

============= vortoj: 460 ============

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.